

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPi@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

Samideano de Malalta Saksio vizitis Normandion



Renkontiĝo en Caen - Hérouville

Malalta Saksio estas lando de nord-okcidenta Germanio kiu enhavas preskaŭ 8 milionojn da loĝantoj. Ĉefaj urboj de tiu lando estas :

Hanovro (516.000 loĝantoj), **Braunschweig** (246.000), **Osnabrück** (165.000), **Oldenburg** ktp...

Pro kanzono de fama franca kantistino Barbara, multaj Francoj aŭdis pri saksa urbo **Göttingen**. Ankaŭ fama estas la urbo **Hameln** (franclingve Hamelin) pro la legendo de flutludanto aŭ Ratkaptisto (Germane : Rattenfänger) Tiu legendo estis famigita en la tuta mondo dank'al la fratoj **Grimm**. Somere la legendo estas ludata de aktoroj sur la granda placo de la urbo. Ni mem ĉeestis kun plezuro la spektaklon. La nomo de la loka bulteno de esperantistoj de Hameln estas « **Ratkaptista Kuriero - Informilo de la ratkaptista bando** » Ankaŭ tre konata de esperantistoj

estas la urbo **Herzberg am Harz**. En 2006 urba konsilantaro decidis ŝanĝi la nomon de la urbo kiu nun estas « **Herzberg die Esperanto-Stadt** » La Interkultura Centro estas tre aktiva. Dum 2008 la Universala Kongreso okazos en Rotterdam kaj la Antaŭkongreso okazos en **Herzberg**. Jam restoracioj tradukis esperanten menuojn !

Kvankam plej multaj Francoj vizitas sudan Germanion (Bavario), la nordo estas vizitinda kun belaj pejzaĝoj kaj pitoreskaj urboj. **Hanovro**, malgraŭ militdetruoj estas bele rekonstruita kun interesaj monumentoj, muzeoj, ĝardenoj kaj malnovaj domoj kun traboj. Ĝi estas hansea (han-séatique) urbo kaj nun ĝi estas tre aktiva por organizado de foiroj kaj kongresoj.

Malalta Saksio ne estas ebenaĵo; multaj montoj estas videblaj kaj sudoriente troviĝas montaro nomita **Harz**. Plej gravaj altaĵoj estas **Brocken** (1142m.) kaj **Wurmberg** (971 m.). La regiono estas tre bela kaj tre vizitata de turistoj.

Malalta Saksio estas partnera regiono de Normandio. Multaj urboj de tiu lando estas ĝemelataj kun normandaj urboj. En tiuj urboj ekzistas Esperanto-kluboj kiuj estas regroupitaj en landa asocio nomata **EMAS** (**E**sp^{er}**a**nto en **M**al**a**lta **S**ak**s**io) ...

En tiu numero :

Vojaĝraporto	2
Adiaŭ al nia amiko Maurice	3
Kongreso en Martigues	3
Eŭropa tago de Lingvoj	4 -
26a de septembro	5
2008 Internaciaj Kongresoj	5
Vivu la Normanda Klimato !	6
2008 Betteville. Normandio	6

Paĝo 2a

Antaŭ unu jaro, mia edzino kaj mi estis invitataj ĉe niaj korespondantoj kiuj loĝas en **Laatzen** ĝemelita urbo de **Grand Quevilly**. Dum septembro 2007, mi invitis ilin viziti Normandion. Venis **Klaus Schlüter** (lia edzino ne povis kuniri). Estis por li tre agrable renkonti normandajn esperantistojn kaj viziti nian regionon, ĝuante belan veteron.

Kun **Ruenanoj**, li malkovris nian urbon kaj ties monumentojn. La sekvantan tagon, ni veturis al **Hérouville**; tie, diskutante kun deko da membroj, ni tagmanĝis en la ĝardeno de **Yves Nicolas**; revenante, ni laŭiris marbordon, ni travizitis **Caubourg**, **Deauville**, **Honfleur** kaj **Ponten de Normandio**. La programo de sekvanta tago estis **Pays de Caux** kun rapida vizito de **Fécamp**, **Yport**, **Etretat** kaj renkontiĝo kun **Havraj** samideanoj en diskutkafejo. Vespere ni estis elkore akceptataj de **Geamikoj Pottier** kie ni bone vespermanĝis kune kun gelernantoj de **Pierre Pottier**.

Rezultis el tiu vizito la deziro pli intensigi renkontojn inter la kluboj de niaj regionoj. Unu el la problemoj solvendaj estos trovi domon kie eblos loĝigi malgrandajn grupojn. Vizitoj povus estis kiam okazos esperantistaj aŭ neesperantistaj eventoj.

PETRO KIJO



Promenado sur Ruenaj stratoj

Vojaĝraporto :

Komisiite de la estraro de **EMAS** (**E**sp^{er}**a**nto **M**al*A*lt*a* **S**aksio), mi daŭrigis la kontaktojn inter Malsupra Saksio kaj ĝia partnera regiono Normandio, kiuj komenciĝis en septembro 2006 per la vizito de ge-sroj **Quillaud** el **Grand Quevilly** (**Rouen**) en **Laatzen** (**Hannover**). Tiam ni vizitis Esperanto-grupojn en **Hannover**, **Hildesheim** kaj **Hameln**.

Grand-Quevilly estas la ĝemela urbo de mia loĝurbo **Laatzen**, simile kiel **Rouen** estas tiu de **Hannover**. Ambaŭ antaŭurbetoj situas je proksimume sama distanco (ĉirkaŭ dek km) de la « granda frato » kaj estas konektitaj de po du tramlinioj. Ĉar inter la urbaj kaj landaj registaroj ekzistas bonaj kontaktoj kun reciprokaj vizitoj, ni strebu ke estu simila kontakto ankaŭ inter la Esperantistoj.

De la 3a ĝis la 7a septembro 2007 mi estis afable invitita de ge-sroj **Quillaud** al sia hejmo en **Grand Quevilly**, kaj dum tiuj tagoj ili kun mi vizitis kelkajn normandajn E-o-grupojn, kie mi estis afable ricevita per manĝado kaj trinkado de po ĉirkaŭ 10 membroj.

La unua estis la grupo de **Rouen**, kie speciale **Pierre Lemarchand**, la nova redaktoro de **Normanda Esperanto Bulteno** kaj tiel posteulo de **Petro Quillaud**, montris la multajn vidindaĵojn de la urbo dum preskaŭ tuttaga rondiro.

La postan tagon ni estis en **Hérouville**, proksime de **Caen**, kie la aktivulo **Yves Nicolas** kun sia edzino invitis al lunĉo en sia ĝardeno kun longa diskutado pri komunaj intereso. Ankaŭ ĉeestis la prezidanto de tiu vigla klubo, **Gérard Senecal**.

Ni ankaŭ estis en **Le Havre**, kie ni renkontiĝis kun la membraro en trinkejo, gvidataj de la prezidantino **Sylvie Caron**, kaj en **Yvetot**, kie ni pasigis agrablan vesperon la privata domo de ge-sroj **Pottier**.

Por intensivigi la kontaktojn, ni interkonsentis ke ni komencu konatiĝi sur pli vasta privata nivelo, ekzemple tiel ke mia unupersona vizito estu respondita per vizito de pluraj personoj aŭ paroj el normandaj Eo-grupoj, kiuj estu akceptitaj de E-aj familioj en malsamaj urboj de nia lando, eble kun samtempaj vojaĝetoj al apudaj grupoj por interkonatiĝi; kaj ke la jaron poste la vizititaj E-stoj komune vojaĝu al Normandio.

Je tiu okazo mi esprimas mian dankon al ĉiuj, kiujn mi renkontis en Normandio.

KLAUS SCHLÜTER 30a sept. 2007



Klaus kaj Petro Kijo en Rouen

Landa Esperanto-kongreso



Dum la Paska periodo okazos impona Esperanto-kongreso en Francio. Ĝi okazos de la **21a ĝis la 25a de marto 2008**.

La unuan fojon, ekde Bulojno 2005, ĉiuj francaj Esperanto-asocioj kunvenos kune (*Esperanto-France*, *JEFO SAT-Amikaro*, *GEE instruistoj*, *FET laboristoj*, *FKEA katolikoj*, eble ankaŭ fervojistoj).

La ĉeftemo de la renkontiĝo estas « Lingvoj kaj kulturoj en Mediteraneo ». Kompreneble okazos turismaj ekskursoj kaj junulara programo.

Kotizo estas senpaga por eksterlandanoj. La kongreso okazos en **MARTIGUES** apud Marseille, kie situas nova flughaveno.

Do ne hezitu plani vojaĝon en Mediteraneo kaj Provenco dum printempo 2008.

Adiaŭ al nia amiko Maurice

Nia havra samideano forpasis la 2an de septembro 2007. Nia klubo perdis memortransdoninton, sinceran kaj pasian esperantiston.

MAURICE HUET esperantiĝis dum la kvardekaj jaroj. Li fervoris tiel sincere en nia movado kiel por siaj personaj engaĝiĝoj. Li kunagis kun **Jean Gibaux** por la daŭreco de nia pionira asocio. Li iĝis honorprezidanto de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj.

Pro sia pasio por lingvoj, li studis diligente kelkajn eŭropajn idiomojn. Por nia rondo, li ankaŭ estis nia profesoro. Kiel klera esperantoparlanto, li ofte konsilis nin por pli bona regado de nia scipovo pri Esperanto.

Li partoprenis multajn esperantistajn renkontiĝojn kaj kune kun normandaj samideanoj, ni spertis entuziasmigan jubilean kongreson en Varsovio (1987).

Nia samideanaro kondolencas al lia edzino Christaine kaj gefamilianoj.

Sylvie CARON



« Estas la jara lern-rekomenco en Caen - Hérouvillle ! »

Grupanoj kaj grupestroj, same kiel niaj geamikoj el la Caen - regiono, ne forgesu sendi fotojn, artikolojn pri viaj lokaj kursoj, asociaj renkontiĝoj, informaj agadoj ktp... al via bultenisto pere de Interreta adreso :

LEMARCHANDPI@wanadoo.fr Antaŭdankojn !


Vi ankaŭ povas sendi adresojn de novaj lernantoj, por ke ili povu senpage ricevi ĉi-jare nian asocian bultenon. *Feliĉan novjaran lernagadon al ĉiuj !*

Ĉu vi sciis la sekvajn faktojn ?

- Estas inter 6000 kaj 7000 lingvoj en la mondo - parolataj de ses miliardoj da homoj dise en 189 sendependaj ŝtatoj.
- Estas proksimume 225 indiĝenaj lingvoj en Eŭropo - tio estas 3% de la tutmonda sumo.
- La plimulto de la lingvoj de la mondo estas parolataj en Azio, Barato, Afriko kaj Sudameriko.
- Multaj eŭropanoj pensas, ke la plej granda parto de homoj parolas nur unu lingvon, sed, fakte almenaŭ duono de la monda loĝantaro estas dulingva aŭ plurlingva, tio signifas, ke ili parolas du aŭ pli da lingvoj.
- Neniu lingvo estas en si mem pli malfacila ol iu ajn alia - fakte ĉiuj infanoj lernas sian denaskan lingvon en la sama natura maniero kaj kun egala facileco.
- Multaj lingvoj havas 50.000 vortojn aŭ pli, sed individuaj parolantoj, normale scias kaj uzas nur parton de la tuta vortostoko : en ĉiutaga konversacio oni uzas la samajn kelkcent vortojn.
- Lingvoj estas en konstanta kontakto unu kun la aliaj kaj ili influas unu la alian en multaj manieroj : en la pasinteco la angla lingvo depruntis vortojn kaj esprimojn de multaj aliaj lingvoj kaj nuntempe eŭropaj lingvoj depruntas multajn vortojn de la angla.
- En sia unua jaro bebo eldiras larĝan gamon de laŭtaj sonoj : ĉirkaŭ la unua jaraĝo estas eldiritaj la unuaj kompreneblaj vortoj; ĉirkaŭ la tria jaro estas formitaj kompleksaj propozicioj; ĉirkaŭ la kvina jaraĝo infano scipovas kelkmilojn da vortoj.
- La gepatra lingvo estas kutime la lingvo kiun oni plej bone scipovas kaj kiun oni plej ofte uzas. Sed ekzistas « perfektaj dulingvuloj » kiuj egalbone parolas du lingvojn. Tamen, normale, dulingvuloj ne montras perfektan ekvilibron inter siaj du lingvoj.
- Dulingvismo kunportas multajn avantaĝojn : ĝi plifaciligas la lernadon de aliaj lingvoj, plibonigas la pensprocezon kaj antaŭenigas kon-

taktojn kun aliaj personoj kaj iliaj kulturoj.

- Dulingvismo kaj multlingvismo kaŭzas ekonomiajn avantaĝojn. Ankaŭ laborpostenoj estas pli facile haveblaj al tiuj, kiuj estas poliglotoj, kaj plurlingvaj kompanioj havas pli bonan pozicion kontraŭ la konkurentoj ol unulingvaj.



• Lingvoj interrilatas unu kun aliaj kiel la membroj de familio. La plimulto de la eŭropaj lingvoj

apartenas al la granda hindeŭropa familio.

- La plimulto de la eŭropaj lingvoj apartenas al tri grandaj grupoj : la ĝermana, la romanika (aŭ latinida) kaj la slava grupo.
- La ĝermana familio de lingvoj inkluzivas inter aliaj la danan, norvegan, svedan, islandan, germanan, nederlandan, anglan kaj jidan.
- La latinidaj lingvoj inkluzivas inter aliaj la italan, francan, hispanan, portugalan kaj la rumanan.
- La slavaj lingvoj inkluzivas la rusan, ukrainan, belarusan, polan, ĉeĥan, slovakon, slovenan, serbian, kroatan, macedonian, bulgaran kaj aliajn.
- La plimulto de la eŭropaj lingvoj uzas la latinan alfabeton. Iuj slavaj lingvoj uzas la kirilan alfabeton. La greka, armena, kartvela kaj la jida lingvoj havas sian propran alfabeton.
- La denaskaj lingvoj parolataj de la plimulto de la eŭropanoj estas la rusa, germana, angla, franca kaj itala lingvo, en tiu ĉi vicordo.
- La neeŭropaj lingvoj plej vaste uzataj en Eŭropo estas la araba, ĉina, kaj la hindia lingvo, ĉiu kun sia skribsistemo.
- Rusio (148 milionoj da loĝantoj) certe havas la plej altan nombron de lingvoj parolataj sur sia teritorio : inter 130 kaj 200, depende de la vidpunktoj.
- La plimulto de la landoj en Eŭropo havas kelkajn regionajn aŭ minoritatajn lingvojn - kelkaj el ili havas oficialan statuson.

- Pro la enfluo de migrintoj kaj rifuĝintoj, Eŭropo fariĝis tre plurlingva. Nur en Londono 300 lingvoj estas parolataj (araba, turka, kurda, berbera, hindia, pangaba, ktp...).
- En sia ĉiutaga vivo eŭropanoj ĉiam pli kaj pli renkontas fremdajn lingvojn. Necesas estigi pli grandan intereson pri lingvoj ĉe la eŭropaj civitanoj.

Fonto :

La artikolo estas traduko de la dokumento, publikigita okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj.

*Ĝi legeblas en la paĝo de la Konsilio de Eŭropo :
<http://www.ecml.at/edl/default.asp?t=materials>*

Dankon por la traduklaboro al Remy Sproelants (BE).

* *La ĉefaj celoj de la Eŭropa Tago de Lingvoj estas altigi la konscion pri la riĉa lingva diverseco de Eŭropo kaj instigi la homojn lerni pli da lingvoj.*

Eŭropo, riĉeco de lingvoj

Artikolo trovita ĉe www.edukado.net

Monda Mozaiko : 2007 septembro - Ĉu vi scias la sek-vajn faktojn ?



Limdato por la sendado de viaj artikoloj kaj fotoj por la venonta numero de Normanda Esperanto Bulteno, kiu aperos komence de januaro 2008 : 25a de decembro 2007. Antaŭdankon pro la ricevo de viaj pres-materialoj !

Tria listo de kotizintoj por 2007

Rigardu ĉu via nomo estas en la ĉi-suba listo : *Ge-Soj :*

KLEIN, LELOUEY, LEPREVOST, PARIS Y.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**
Abon-kotizo por 2007 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto : .

Pierre Lemarchand, 2 Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.



2008 : Internaciaj Kongresoj

S.A.T. :

08 - 15 aŭgusto 2008 :

La bulgara urbo **KAZANLAK** kiu situas en la fama « Valo de la rozoj » akceptos la 81an kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda.

U.E.A. :

19 - 26 julio 2008 :

En **ROTTERDAM** Nederlando, okazos la 93a Kongreso de Universala Esperanto Asocio.

T.E.J.O. :

26 julio - 2 aŭgusto 2008 :

En **SZOMBATHELY** (80000 enloĝantoj, ĉe la okcidenta landlimo de Hungario), okazos la 64a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

19a Nordfrancia Eŭropa Esperanto-Rendevuo la 17/18 de novembro 2007, en Morbecque-Le-Parc. 59190 Hazebrouck :


Sino VALET France, 274 rue du Boulenniez 59235 Bersee. Tel. : 03.20.84.96.09.

rf.valet@wanadoo.fr

Programo : inaŭguro, paralelaj studgrupoj, distra programo, diskutrodo.

JoMo kantos en pli ol 20 lingvoj sabaton vespere.

Maryvonne Robineau prelegos pri la temo : Survoje al Kompostelo, dimanĉon posttagmeze.



Poŝtmarko
eldonita en
Ĉinio.
1986.71a
Universala
Kongreso

ESPERANTO - NORMANDIE

Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures

Vivu la Normanda Klimato !

Multaj sudanoj papagumas
Pri nia normanda klimato,
Ke ĝi ofte malbonveteras,
Sed ne pravus tia aserto !

Ili diras ke ĝi konvenas
Ja al bovinoj kaj pomarboj,
Sed neniel, neniam taŭgas
Por normale faritaj homoj.

Memfidege ili sarkasme
Volas ignori statistikojn
Kiu kontraŭas evidente
Iliajn suprajajn fidojn.

Fakte, kion diras l'izojeto (1)
Kiu en Caen, ekzemple pasas ?
Ke tie jare falas pluvo
Multe malpli ol en Palavas.

Tiam klaĉuloj argumentas
Spite nerefuteblaj faktoj,
Ke nia ĉielo pluvadas
Malmulte, ded dum tri cent tagoj.

Ni rebatu ĉi malindaĵon :
Tio montriĝas avantaĝon !
Niaj herbejoj kaj fruktarbejoj
Ĉiam verdadas en kamparoj.

Laŭ ii pravas heliografo (2)
Ke sude pli... « belveteras » !
Ni ridu ! Ĉe ili epitaĵoj
Haŭtkanceron ne mencias !

Ĉe ni tiun malsanon riskas,
Nur tiuj kiuj suden iras
Por sunbruliĝi sub mistralo
Kaj sin oferi al fatalo !


Freŝa vetero nin vigligas,
Laborigas, kaj donas sanon.
Male varmo seka moligas,
Kaj malaltigas produktadon.

Tial, tie, ĉe ni Normandoj,
Bonaj nutraĵoj abundegas.
Vivu do pluvo kaj nubegoj
Kiujn favora sorto donas !

Henri ROUSSEAU

(1) **Izojeto** : France « izohyète » : linio kiu sur mapo kunigas la lokojn kiuj jare ricevas la saman pluvokvanton.

(2) **Heliografo** : (PIV) :
meteologia instrumento
kiu ĉiutage registrigas la
daŭron de sunbrilado.



Poŝtmarko eldonita en Bulgario. 1957.
50 datreveno de Bulgara Eo Asocio. 70
datreveno de ekapero de Esperanto



Poŝtmarko eldonita en
Belgio. 1982. 67a Uni-
versala Kongreso en
Antverpeno. Babelturo.



La Chaumière, Gîte de France

**N'oubliez pas notre rendez-vous
annuel pour l'assemblée générale
d'ESPERANTO-NORMANDIE :**

Le samedi 24 Mai et dimanche 25 Mai
2008.

à BETTEVILLE, Seine Maritime,
auprès de l'abbaye de Saint Wandrille,
de Caudebec en Caux et du pont de
Brotonne sur la Seine.

**Ainsi que notre stage de conver-
sation et de perfectionnement :**

samedi 27 et dimanche 28 septembre
2008

à la même adresse. Tous les détails et
renseignements dans le prochain nu-
méro, avec le bulletin d'adhésion.